# *Komuna studo rekonas la kunordigan kaj ampleksan respondon de Kubo al Kovim-19*



Havano, dec 27 (RHK) Fakuloj de Usono kaj Kubo rekonis la respondon de la kariba nacio en la konfronti?o kun Kovim-19 kiel kunordigita kaj ampleksa, artikolo en la loka gazetaro publikigita hodia?.

La teksto, subskribita de esploristoj de la Universitato de Alabamo, en la nordamerika urbo Birmingham; kaj la Instituto de Tropika Medicino Pedro Kourí, en Kubo, elstarigis diferencojn en la traktado de la pandemio en amba? landoj, kun pli bonaj rezultoj por la insulo.

"Kvankam Kubo kaj Usono diferencas unu de la alia multmaniere, iliaj respektivaj spertoj, precipe la rezultoj, montras klarajn fiaskojn en Usono", emfazis la eseo.

La pli kunordigita kaj ampleksa respondo al la malsano en la antila lando rezultigis signife pli bonajn rezultojn kompare kun Usono, li aldonis.

"En Kubo, la Ministerio de Publika Sano prenis respondecon je ?iuj niveloj: de la liverado de sanservoj ?is la konservado de la universaleco kaj pagebleco de la sistemo e? anta? tutmonda sankrizo", ?i aldonis.

Dume, en Usono, malcentralizita strukturo permesis disi?on de a?toritato kaj respondeco inter multnombraj federaciaj kaj ?tataj instancoj, kaj klara gvidanto ne aperis, emfazis la teksto.

La organizo de la kuba kaj usona sansistemoj estis ?efa determinanto de ilia respondo al la pandemio ?ar, respektive, ili produktis konsistencon kaj klaran direkton, a? malorganizadon kaj kontra?diran gvidadon.

La respondo al pandemio dependas multe de sanprotektaj reguloj kaj decida gvidado, kiujn multaj usonanoj perceptis kiel malobservo de individua libereco, la artikolo agnoskis.
En Kubo, la alpreno de striktaj kontroliniciatoj kaj la plenumo de la registara gvido de la plimulto de la lo?antoj sendube faciligis la sukcesan respondon al Kovim-19.

"Neniu  lando venkis la pandemion, kaj plia esplorado povas ekzameni eblajn diferencojn en la malstre?i?o a? plifortigo de limigoj rilate al Kovim-19 en Kubo kaj Usono kaj la postaj efikoj," ?i diris.

Samtempe, la teksto rekonis la efikon de vakcinoj kaj iliajn novajn defiojn por amba? landoj.

Estontaj studoj povas ekzameni komparajn sukcesojn por identigi efikajn distribuajn kaj administrajn strategiojn, ?i finis.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/281041-komuna-studo-rekonas-la-kunordigan-kaj-ampleksan-respondon-de-kubo-al-kovim-19

Radio Habana Cuba